

Veranstaltungshinweise

Wir haben Esp.-Lernrunden für Anfänger (Einzelheiten: Anne; s. Impressum) u. Fortgeschrittene (do. 20:30-21:15 Uhr per Skype). Und:

06.09.2018 19:30 Uhr	<i>Bunte Kuh</i> , Edenbütteler Str. 5, 27809 Lemwerder	Vereinstreffen m. Vortrag „Kio estas Unikodo kaj kiel mi povas uzi ĝin?“
18.10.2018 19:30 Uhr	<i>Friesenheim</i> , Friesenstr. 15, 26935 Stadland	Vereinstreffen
15.11.2018 19:30 Uhr	<i>Wiechmanns Weserhotel</i> , Mitteldeichstr. 51, 26919 Brake	Vereinstreffen
17.01.2019 19:30 Uhr	<i>Kogge</i> , Rathausplatz 7, 26931 Elsfleth	Vereinstreffen

Gäste sind willkommen. Aktuelles u. Einzelheiten können unserer Netzseite (s. unter „Impressum“) entnommen werden; allerneueste Infos: <https://twitter.com/egu1995>. Außerdem:

07.-10.06.2019	Deutsch-Dän. Esperanto-Kongress	Neumünster
20.-27.07.2019	104. Esperanto-Weltkongress	Lahti, Finnland
28.07.-04.08.2019	75. Internat. Jugend-Kongress	Liptovský Hrádok, Slowakei

Mehr: <http://eventoj.hu/kalendaro.htm>

Ĝojan kristnaskon kaj bonan gliton en la novan jaron!

Impressum:

Zeitschrift: Esperanto Gazeto (ISSN 1861-3330)
Erscheinungsweise: dreimal jährlich als Druck- u. elektronische Ausgabe,
Netzseite: <http://www.esperanto.de/unterweser/gazeto.htm>
Herausgeber: Esperanto-Gruppe Unterweser e. V.
 (<http://www.esperanto.de/unterweser>)

Information und Redaktion: Anne Höpken, Schulstr. 13a,
 26954 Nordenham, Tel.: 04731-4837;
 Dörte Bierkämper, Tel.: 04404-3368;
 Dr. Andreas Kück, Tel.: 04702-5044;
 Mario Müller, Tel.: 04732-1373

Bankverbindung: Raiffeisenbank Oldenburg eG,
 IBAN: DE26 2806 0228 1200 1600 00
 Kassenwartin: Dörte Bierkämper

EGU - Esperanto - Gruppe Unterweser e. V.

Esperanto Gazeto

N-ro 53

ISSN 1861-3330

Okt. 2018 – Jan. 2019

EGU-Info: <http://www.esperanto.de/unterweser>



Wien / Vieno, 2018-07-12: Im Esperantomuseum / En la Esperantomuzeo.

Für die EGU-Mitglieder: Am 25.05.2018 trat die neue europäische Datenschutz-Grundverordnung (DSGVO) in Kraft. Bedingt durch eine Vielzahl neuer Regelungen im Umgang mit personenbezogenen Daten informieren wir Sie darüber, dass wir Ihre Daten (Name, Adresse, E-Mail-Adresse) nutzen, um Ihnen Informationen zu Esperanto, der Esperanto-Bewegung, Esperanto-Veranstaltungen und die Vereinszeitung per Post oder E-Mail zusenden zu können. Diese Daten sind die Grundlage der Verbindung mit unseren Mitgliedern. Wenn Ihre Daten aus dem Adressverteiler gelöscht werden sollen, bitten wir um schriftliche Information. Mit freundlichen Grüßen, Anne Höpken, 1. Vorsitzende.

Mia Esperanto-Julio 2018: Esperantomuzeo kaj -parko; Somera Esperanto-Studado (SES); Deichbrand

(Vieno, 11a, 12a, 13a k 17a; Liptov-Nikolao, 14a ĝis 16a; Wanhöden, 21a de Julio 2018)

Vojaĝante per mia aŭto al kaj reen de la SES-urbo Liptov-Nikolao (slovake: Liptovský Mikuláš) mi pasigis kelkajn tagojn en Vieno. Ĝi abundas je imponaj vidindaĵoj. Ilin mi admiris nur de ekstere. Mi vizitis tamen la Esperantoparkon kaj -muzeon. La unua estas neokulfrapa; sen la tiea Zamenhof-busto mi kredeble ne



Enirejo de la Esperantomuzeo / Eingang des Esperantomuseums

perceptus tiun parkon entute. La Esperantomuzeo, kiu estas parto de la Aŭstra Nacia Biblioteko, entenas kelkajn ekspoziciaĵojn, kiel ekzemple historiajn librojn, fotografiaĵojn kaj aranĝoafiŝojn, kaj krome du libroŝrankojn. Ĉu vere nur du? Nu, du estas alireblaj al vizitantoj; ne alirebla al ili estas granda arkivo aliloke en la konstruaĵo. – Liptov-Nikolao (ĉ. 31000 loĝantoj) situas en la centra Slovakujo en val-kaldrono de la montaro Tatroj. La ĉirkaŭ 200 SES-partoprenantoj havis matene Esperanto-kursojn aŭ, kiel mi, seminarion pri Esperanto-literaturo kaj -kulturo, posttagmeze ekskursojn kaj prelegojn, vespere koncertojn kaj teatraĵon kaj krome – tion mi tre ĝuis – la kuirartan festivalon. La germana "teamo" prezentis ĉi-foje ovolikvoron, Scho-Ka-Kola-on kaj aliajn frandaĵojn. En la fokuso de la dirita seminario estis la Esperanto-literaturo en Sovetio inter la mondmilitoj.

Enigma

	1	2	3	4	5	Horizontale
1						1: montaro en Eŭropo; 2: intensa; 3: pens-objekto [kun finaĵoj de adjektivo k akuzativo]; 4: aliigi; 5: estaĵo de innaska sekso; 6: finaĵo, por marki pasintecon.
2						Vertikale
3						1: sciigi al la publiko; 2: ilo, por determini vertikalecon [kun finaĵoj de adjektivo k akuzativo]; 3: ago de tiu, kiu prenas; 4: sufikso, por marki pasivon [kun finaĵo de adjektivo]; 5: persona nomo de Usona kantistino († 1970); 7: pronomo.
4				7		
5				6		
Ĝuste ordigite, la literoj en la grizaj ĉeloj rezultigas la nomon de Afrika besto longkola.						



*Malnova gharden'.
Je maturaj riboj en
Ghi okazas pren'.
[#hajko](#) [#haiku](#)*

Foto und Haiku von Andreas via Twitter <https://goo.gl/zyqKCn>

la rifuĝintoj kaj por ke aliaj helpantoj, kiuj ne parolas la araban, ne sentu sin, kiel duarangajn. Jasmin estas nekontenta prie, finas sian agadon en tiu tendaro, vojaĝas al la landlimo kun Makedonujo kaj aliĝas al aktivuloj, kiuj helpas ĉe kontraŭleĝaj lim-transpaŝoj.—Intrigo B: Rakontanto skizas la historion de Esperanto kaj ties rolon en sia vivo (interalie gastis ĉe li du junaj virinoj, kiam ili estis survoje al Grekujo). Li klarigas ankaŭ Idon kaj raŭmismon, tamen sen laŭnome menciigi ĉi lastan. — Miatakse tiu radiodramo apenaŭ utilos al la komunumo de Esperanto-parolantoj tiuefike, ke ĝi gajnos novajn anojn. Mi provas klarigi tion en 1) kaj 2), kaj en 3) mi detalas iom mian antaŭan “apenaŭ”:

- 1) Supoze ke la aŭskultanto jam utiligas Esperanton aŭ almenaŭ scias pri avantaĝoj el ĝia utiligado: Tiam la radiodramo ne prezentas al li ion novan pri la nuntempa fakta situacio de Esperanto. En la plej bona okazo li restos plu en la dirita komunumo malgraŭ la pesimismo trasonanta en la radiodramo; ekzemplo: Rifuĝintoj demandas al la instruisto, ĉu en Germanujo, Britujo, Francujo, Svedujo, Danujo kaj Hispanujo oni parolas Esperanton. Unue ne estas respondo; poste ŝi klarigas, ke tie estas homoj, kiuj ĝin parolas, kaj ke ĝi estas ekstra lingvo; kaj fine ŝi koncedas, ke en tiuj landoj oni ne vere povas paroli en ĝi kun la tieuloj.
- 2) Supoze ke aŭskultanto ankoraŭ ne konas Esperanton: Tiam li ja ekscias iom pri ĝi kaj la potenciala utilo, sed sekve de la jam menciita pesimismo kredeble ekestas en li la impresoj, ke Esperanto estas neutila afero (krom por eviti enuon). Tial la aŭskultinto kredeble ne okupiĝos pri Esperanto.
- 3) Kaj jen pri la “apenaŭ” (ĝi ja aludas al malgranda ŝanco): En la intrigo aŭtoritata persono insistas je la angla, kiel la interlingvo uzenda en la tendaro. Tio eble vekos en iuj aŭskultantoj konscion pri la maljusteco konsistanta el jeno: La uzenda interlingvo estas asignebla al kelkaj nacioj kaj tial ne neŭtrala. Kaj tio nepre povus igi iujn aŭskultantojn okupi sin pri lingvaj rajtoj—kaj komenci subteni Esperanton.

— Andreas

SES finiĝis la 22an de Julio 2018. – Laste, sed ne balaste, menciindas la ĉi-jara rok muzika festivalo Deichbrand: Komence de sia koncerto la grupo Freundeskreis ("Amikaro") prezentis "Esperanto". Tio ĉi estas hiphop-peco de 1999 en la germana kaj franca kaj entenas ankaŭ kelke da Espe-




Deichbrand: Freundeskreis

ranto-vortoj. Neniam antaŭe ekster la Esperanto-kosmo mi ĉeestis aranĝon, kie tiom da spektantoj surloke estis prisonigitaj per la vorto "Esperanto". Mi ja tro ŝatus scii, kiom el ili pri ĝi poste sin informis. – Andreas

**Mein Esperanto-Juli 2018: Esperantomuseum und -park;
Sommer-Esperanto-Studierwoche (SES); Deichbrand
(Wien, 11., 12., 13. u. 17.; Liptau-Sankt-Nikolaus, 14.-16.; Wanhöden,
21.07.2018)**

Auf der Reise mit meinem Auto zu und zurück von der SES-Stadt Liptau-Sankt-Nikolaus (slowakisch: Liptovský Mikuláš) verbrachte ich ein paar Tage in Wien. Es ist reichhaltig an beeindruckenden Sehenswürdigkeiten. Ich bewunderte sie nur von außen. Ich besichtigte allerdings den Esperantopark und das Esperantomuseum. Ersterer ist unauffällig; ohne die dortige Zamenhof-Büste hätte ich ihn wahrscheinlich überhaupt nicht wahrgenommen. Das Esperantomuseum, das ein Teil der Österreichischen Nationalbibliothek ist, beinhaltet einige Exponate, wie z. B. historische Bücher, Fotografien und Veran-

staltungsplakate, sowie zwei Bücherschränke. Wirklich nur zwei? Nun, zwei sind Besuchern zugänglich; ihnen nicht zugänglich ist ein großes Archiv, das sich andernorts in dem Gebäude befindet. – Liptau-Sankt-Nikolaus (ca. 31000 Einwohner) liegt in der mittleren Slowakei in einem Talkessel des Tatra-Gebirges. Die etwa 200 SES-Teilnehmer hatten morgens Esperanto-



Kvizdemando ĉe SES: Inter kiuj aferoj estis la lasta skismo en la Esperanto-movado? Precipe la lasta respondo-eblo ("kunsidismo kaj turistismo") kaŭzis ridadon / Quizfrage beim SES: Zwischen welchen Sachen gab es die letzte Spaltung in der Esperanto-Bewegung? Besonders die letzte Antwortmöglichkeit („Sitzungs-isten und Touristen“) verursachte ein Lachen

Kurse oder, wie ich, ein Seminar über Esperanto-Literatur und -Kultur, nachmittags Ausflüge und Vorträge, abends Konzerte und eine Theateraufführung sowie – das genoss ich sehr – das Kochkunst-Festival. Das deutsche „Team“ bot diesmal Eierlikör, Scho-Ka-Kola und andere Naschsachen dar. Im Fokus des besagten Seminars war die Esperanto-Literatur in der Sowjet-



Kuirarta festivalo / Kochkunst-Festival

union zwischen den Weltkriegen. SES endete am 22.07.2018. – Nicht zuletzt erwähnenswert ist das diesjährige Rockmusik-Festival Deichbrand: Zu Beginn ihres Konzerts präsentierte die Gruppe Freundeskreis „Esperanto“. Das ist ein



Blick auf einen Teil von Liptau-Sankt-Nikolaus / Vido al parto de Liptov-Nikolaos

Hip-Hop-Stück von 1999 auf Deutsch und Französisch und enthält auch ein paar Esperanto-Wörter. Nie zuvor war ich außerhalb des Esperanto-Kosmos bei einer Veranstaltung zugegen, bei der so viele Zuschauer vor Ort mit dem Wort „Esperanto“ beschallt wurden. Ich möchte ja zu gerne wissen, wie viele von ihnen sich darüber wohl im Nachhinein informiert haben. – Andreas

lom da rezonado pri la radiodramo “Esperanto”

Unue jen pri la intrigo de la radiodramo “Esperanto”^{*)} de Lucas Derycke: Efektive estas du alterne kaj paralele prezentataj intrigoj. Intrigo A: En por-rifuĝinta tendaro en Grekujo alvenas du novaj portempaj helpantoj: Hanna el Germanujo kaj Jasmin el Belgujo (ŝi studas en Germanujo). Ili komencas instrui deire de la angla Esperanton al rifuĝintoj, ĉar kelkaj el la rifuĝintoj petis pri pli da aktivado. La virinoj provas paroli kun rifuĝintoj ankaŭ arabe, sed aŭtoritata persono inter la helpantoj insistas je tio, ke oni parolu angle en la tendaro, por ke restu distanco al

^{*)} <https://goo.gl/VU8CMq>